
Filipina Esperantisto



Organ of the Philippines
Esperanto Association

VOL. II., No. 4 NOV.-DEC., 1908



D-RO H. W. YEMANS,
Prezidanto de l' Filipina Esperanta Asocio

Digitized by Google



The Smile of Satisfaction

on the face of
every smoker
who lights a
"JOSE RIZAL" CIGAR
continues until the stub
is tossed away. Reason:
Every cigar is the same
cool, refreshing smoke
from start to finish.

INSIST ON GETTING A

José Rizal

Remember the money is
yours and that dealers
seldom offer a substitute
or "something just as
good" for your benefit.
This cigar is sold by
all live dealers who
cater to the wants of
their customers

Walter E. Olsen & Co.
CIGAR & TOBACCO MERCHANTS MANILA

TWO STORES:

Kiosko Habanero
27 Escolta

Kiosko Rizal
168-170 Escolta

AT ONE PLACE

IN MANILA YOU CAN GET SHIRTS AND UNDERWEAR MADE TO ORDER BY EXPERIENCED CUTTERS WHO ARE EXCLUSIVELY DEVOTED TO THIS LINE; ALL ARTICLES WILL BEAR THIS MARK

MANILA SHIRT FACTORY
MANILA

WHICH IS A GUARANTEE OF FIT, WORKMANSHIP, QUALITY AND COMFORT

127 ESCOLTA
Moderate prices

Fresh Films,

Plates and Paper

Illustrated
Postcards

KODAKS AND CAMERAS

DEVELOPING AND PRINTING

PHOTO SUPPLY CO.
145-147 ESCOLTA
MANILA

Digitized by Google

Filipina Esperantisto

Organ of the Philippines Esperanto Association

P. O. Box 326, Manila, Filipina Insularo

FRATERNITY AT DRESDEN IN 1908.

Many have asked me since my trip to the Fourth International Congress of Esperanto, in August last, what the most striking feature of the meeting appeared to me to be. And I have invariably replied, as any one who was present must reply, that the greatest feature, by far, was the absolute feeling of perfect fraternity that permeated the whole assembly.

One may smile at the idea that people should assemble from the most remote corners of the earth, from Brazil, Japan, Canada, South Africa, Norway, Spain, Russia, Roumania, Holland, and from other places equally diverse as to language and manners and yet be able from the very beginning to converse with any of their confrères upon any subject that they might wish to discuss. And yet I myself found no difficulty whatever in conversing with people from these countries using the common tongue.

It was hard for one who had always been accustomed to attending conventions in which the language was English, to believe that intelligibility could be secured in a conference where there was such a marked diversity of physiognomy and so patent evidence that the persons composing it were from widely separated regions.

The most cordial daily salutations were followed by questions as to one's country, the work of the Esperantists in one's locality, as well as information with regard to conditions in their own home countries.

Nobody in Dresden felt otherwise than perfectly at home among his fellow Esperantists; one felt perfectly free to ask questions or make requests of anyone whom he might meet with perfect assurance that he would receive the fullest possible information in the most cordial spirit of good will.

The officers of the Congress were all men of large human interests and yet they freely gave of their time to the discussion of individual needs among the hundreds of delegates present. Everyone was looked after with a dispatch and a good will that seldom characterize gatherings where all the participants are of the same nationality.

The people of Dresden outdid themselves in extending courtesies to the visitors; the city authorities furnished free street car tickets to delegates for the entire week of the Congress; the Elbe River steamboats and the Railroads free transportation to the points of excursion that had been planned by the committee on entertainment while the private residents placed their houses at the disposal of the committees, for the accommodation of Esperantist visitors. Policemen and storekeepers spoke Esperanto, conductors on tramcars and pursers on the boats could answer one's questions in Esperanto as well as in their own native language, and the readiness with which they responded to inquiries showed conclusively that their desire to aid was not merely from a perfunctory standpoint, but from a real sympathy with those who had come so far to visit their city.

To show the degree to which the spirit of fraternity permeated the Congress, my wife who did not then understand the language remarked repeatedly that she did not see how so many people from such distant points of the earth could be so very friendly and jolly upon such short acquaintance and that there must be some real magnetic power about Esperanto which could hold individuals so unlike in tasks and training in such a bond of brotherhood.

Previous to the Congress there had been considerable talk about the schism which was planned for Dresden by the followers of a false and plagiarized language, the promoters of which had determined to rout the Camp of Esperanto and put our beloved *majstro* in disgrace; but certainly these enemies must have gotten scared at their own temerity or must have appreciated in time their own weakness, for during the whole session there was naught but the most perfect harmony among the persons present.

Our honored *majstro*, Dr. Zamenhof, was present at every session and his coming was the signal for an open-hearted and spontaneous applause which never failed to bring a blush of pride to his cheeks, and to say that he is beloved by more persons at the present day than almost

Digitized by Google

any other living individual would hardly be stating the case too strongly.

That his presence lent zeal to the Congress goes without saying, and yet he has perfected and put before the world a force for good which is so potent and universal that even had he not been at Dresden there must have existed the same loyal allegiance to his truths and his high ideals as those which were actually manifest.

He said to me, "Tell the gesamideanoj in the Philippines that I am proud of them, proud because they, in a region where there is such a great diversity of tongues, have taken up the means whereby they may freely enjoy intellectual intercourse and thus be drawn closer together spiritually."

I shall give at a future time some of the more detailed features of the Congress such as an account of the Drama presented in Esperanto. The Excursion to the Bastei, the international costume ball, and the special concourse of the "Revuo," but now suffice to state that I have never before been in a gathering where there appeared to be more real, genuine brotherhood concretely expressed than in Dresden at the Esperanto Congress of 1908.

CHARLES S. BANKS.

KIAMANIERE NI PLIRIĈIGOS NIAN KOMUNAN VORTARON

(El Antaŭparolo al verko de S-ro Boulet "Du mil novaj vortoj.")

Esperanto—kiel tre prave skribas S-ro Grabowki—fariĝis lingvo viva, kiu povas disvolviĝi nur tiel, kiel la ceteraj lingvoj vivantaj. Aliflanke, kaj ne malpli grave. Prof. Jespersen deklaras, "ke ĉiu individuo povas enkonduki en la lingvon ŝanĝojn, konscie aŭ nekonscie. Se li trovas neniun, kiu lin imitas, lia novigo estos per tio mem, mortinta. Se, kontraue, ĝi trovas imitantojn ĝi iĝas regulo."

La tasko de l' leksikografiisto estas do: zorge kolekti, la novajn vortojn kaj esprimojn, kiuj troviĝas en plej bonaj, ŝatataj kaj imitataj verkistoj. Li plie kolektos la novajn vortojn kaj esprimojn plej oftajn, kiuj iom post iom eniras en la lingvon komunan dank' al la gazetoj, cirkuleroj, programoj, katalogoj, k. t. p.

Ĉiu tio ĉi, same kiel la fakaj aŭ ĝeneralaj vortaroj verkitaj de kompetentaj privatuloj, estas la necesega antaŭkaj prilaboro, kiu liveros in lan materialon, al Lingva Komitato aŭ Akademio, kies rolo estas ne korekti la lingvon laŭ "aprioriaj" principoj, sed montri laŭ scienca filologia metodo la plej komunan internacian uzon, la novajn generale akceptitajn vortojn kaj konservi, *sub internacia aŭtoritato kaj kontrolo*, la necesan unuecon, la necesan harmonion.

En tiu sole ebla metodo kelkaj vidas gravan danĝeron. Ili timas, ke tiuj diversaj verkistoj enkonlukus en la lingvon novajn vortojn nenecesajn, aŭ malbone faritajn, aŭ por unu sola ideo tro multajn. Ke tio okazas kaj okazos en Esperanto kiel en ĉiuj lingvoj, ne estas dube, sed ne pli grava estas la danĝero por nia lingvo, kiu havas sian komunan *fundamenton*, ol por niaj patraj lingvoj, kiuj havas sian *tradicion*, kaj, praktike, la danĝero estas nur iluzia: vorto nenecesa baldaŭ malaperos, ĉar uzata de malmultaj; vorto malbone farita, post pli malpli longa tempo, iom post iom kaj apenaŭ senteble, estos komune anstataŭata de alia pli normale farita, kaj ankaŭ malaperos; fine, multaj vortoj por sama ideo, *se nur ĉiuj estas facile kompreneblaj*, absolute ne estas danĝero sed kontraue riĉeco: "unu vorto, unu ideo; unu ideo, unu vortoj!" estas alloganta formulo se l, praktike, "logika' eraro, sen ia reala signifo: ĉiu lingvo baldaŭ mortus de tia severa logikeco.

Oni povas esti tute trankvila: la verkistoj diversaj, kiuj havas influon—la aliaj ne estas konsiderin laj—ne malbonuzos liberecon al ili necesan, sed kiu estas samtempe por ili peza honoro kaj postulas seriozan penon. Multaj ĝin apenaŭ uzos. Se oni ne volas mortigi ĉiun iniciativon t. e. detrui la vivon, oni lasos al ili tiun liberecon. Cetere, ĝin rifuzi estas nepre neeble.

Oni ankaŭ diras: "Kial do la Akademio, kiu estas pli kompetenta ol ĉiuj ajn, ne kreus mem la novajn vortojn?" —Ne! ĉar la Akademio ne havas la rajton erari! ĝiaj eraroj estus "oficialaj" kaj pro tio danĝeraj. La Akademio povas nur akcepti tion, kion la vivo, la praktiko montris akceptin la, bona, vivkapabla.

Kaj nun nia "Akademio" laboros. Belan, riĉan, materialon liveris al ĝi dum la lastaj jaroj niaj aŭtoroj kaj leksikografiistoj.

TH. CART,
Direktoro de la Akademia Komisio por la komuna vortaro.

Digitized by Google

PRI MIA VOJAĜO—Parizo kaj Londono

Mia lasta letero priskribis mian vojaĝon ĝis Strassburgo, Germanujo, kie mi havis la grandan plezuron renkonti tiel fervoran kaj studeman grupon da Esperantistoj.

De Strassburgo mi veturis, fervoje, al Parizo, la bela ĉefurbo de Francujo, kaj la centro de l' tutmonda esperanta movado kaj agado, ĉar tie estas nia centra oficejo, kies nelacigebla sekretario, S-ro Chavet, laboradas tiel diligente kaj efikece, por propagandi kaj disvastigi, tra la tutmondo, la karan lingvon.

Tie mi havis la plezuron ĉeesti la ĉiujaran kunvenon de l' tutpariza societaro kaj gruparo, por disdoni la premiojn gajnitajn de la konkurantoj dum la pasinta jaro. Tiu kunveno okazis ĉe la fama eduka instituto, la Sorbonne, kaj la geĉeestintoj estis multnombraj. Orkestro milita ludis kelkajn muzikpecojn. Multaj el la profesoroj kaj instruistoj partoprenis je la kunveno, tiel provante ke inter la fakultato estas multaj entuziasmaj Esperantistoj.

La premioj disdonitaj konsistis el libroj esperantaj, kaj estis gajnitaj de la ricevintoj per iliaj verkoj en aŭ pri Esperanto.

Multaj geeminentuloj francaj-esperantaj ĉeestis la okazintaĵon; inter aliaj Generalo Sebert kaj lia edzino, Carlo Bourlet, la klera redaktoro de La Revuo, Barono kaj Baronino de Menil, S-ro Gaston Moch, k.a.

Kiam mi prezentis mian pasporton de l' Filipina Esperanta Asocio, ĝi motivis multajn esprimojn de surprizo kaj plezuro. Neniu el la ĉeestintoj iam vidis tian dokumenton, tiel bone faritan kiel tiu, kaj oni tuj petis al mi, ke mi permesu fari kopion por eldoni similan, kiel kredindaĵon por la francaj esperantistoj.

Vespere, saman tagon, oni afable invitis min partopreni je la ĉiumonata vespermanĝo de l' pariza grupo, ĉe la Hotel Modern. Tie mi renkontis pli ol kvardek amindajn geesperantistojn, kaj mi havis la grandan plezuron sidi flanke al la carma, bela, sprita S-rino Sebert, kies edzo prezidis la kunsidon.

Multajn esprimojn de plezuro kaj miro pri la sukceso de l' movado en la Filipina Insularo oni diris al mi, kaj ĉiuj sendis koregajn salutojn kaj bondezirojn al la anoj de nia asocio.

Ke mi pasigis plej agrablan vesperon estas kompreneble senvorte, kaj, plue, mi aŭdis S-ron Carlo Bourlet fari unu el siaj neimitebl ŭj paroloj. Tio diros sufiĉe al iu kiu jam aŭdis lin paroli esperante. Lia bona sciado pri la kara lingvo nia; lia bona elparolado; lia spriteco, kaj liaj kleraj kaj lertaj esprimoj, faras liajn parolojn ĉiaman ĝojon kaj plezuron. Aŭdi eĉ unu el liaj paroloj estas ricevi bonan edukitecon pri la akurata uzado de nia kara, fleksebla kaj belsona lingvo.

Miaj scilgoj pri la movado en la Filipina Insularo estis aplaŭde ricevitaj, kaj ĉiuj sendis al nia anaro dankojn kaj bondezirojn.

De Parizo mi vagonare kaj vaporĉipe veturis al Londono, kie mi havis la grandan plezuron konatiĝi kun Kolonelo Pollen, la Prezidanto, kaj S-ro Clegg, la Sekretario de l' Brita Esperanta Asocio, kiuj faciligis al mi ĉiuspecajn ĝentilecojn.

Ankaŭ, mi estis tiel felica fari la konon de Fraŭlino Lawrence kaj Sinjoro W. T. Stead, del' Review of Reviews, kiuj laboradas tiel fervore por disvastigi la lingvon.

La vesperon antaŭ mia foriro, mi vespermanĝis kune kun tiu sindonema Esperanta propagandisto kaj amanto al la tuta homaro, Kolonelo Pollen, ĉe lia klubo. Poste, ni ĉeestis la ĉiusemajnan kunsidon de l' London'a Centra Grupo. La ĉeestintaro estis multnombra; inter ili estis alilanduloj same kiel enlanduloj. Unu el la ĉeestintoj estas aktoro serĉkantisto, kiu antaŭ ne longe burleskis Esperanton en siaj aktoj sur la teatra scenejo angla. Tamen, oni petis lin ne agi tiamaniere sen ia scio pri la lingvo, kaj li, kiel prudenta, saĝa homo ekstudis ĝin. Tuj li vidis, ke Esperanto ne estas memamuzilo, nek afero mokinda, fariĝis fervora disciplo de D-ro Esperanto, ĉesigis sian mokadon kaj la saman tagon de l' kunsido plenumis sian tutan parton, en unu el la plej famaj teatroj londonaj, en Esperanto, kiu ago instigis multajn, eklerni la lingvon. Se nur ĉiuj kontraŭuloj de Esperanto estus tiel ĝustaj, enketi la aferon, antaŭ ol eldoni jugon pri ĝi, ni ne povus fari alimaniere ol respekti iliajn konkludojn, eĉ se la samaj estus kontraŭaj. Tamen, bedaŭrinde, la granda plimulto el niaj kontraŭuloj ne agas tiel ĝuste, kaj sen okupi sin pri ia scio pri la lingvo, malaprobas ĝin. Ĉu tio estas laŭ scienca maniero esplori eĉ la plej negravajn aferojn, kiel la veraj scienculoj devus fari?

Multajn esprimojn de bondeziroj, kaj koregajn salutojn, ĉiuj sendis al la Filipina Esperantistaro.

Mi deziras Gajan Kristnaskon kaj Feliĉan Novanon al ĉiuj.—H. W. YEMANS.

Digitized by Google

LA ESPERANTISTA LIGO DE JUNAJ POPOLOJ

(Helpanto de Esperantista Asocio de Nordo Ameriko.)

Por S-ino W. S. STONER.

La Esperantista Ligo de Junaj Popoloj estas formita por ke helpu la propagandajn penojn de la Esperantista Asocio de Nordo Ameriko.

La klubanoj de tiu ĉi ligo kredas ke la junaj popoloj kondukos la maljunajn popolojn al la "Hejmon de Esperantismo kaj Paco."

Ĉar la junaj popoloj de la Filipina Insularo vivas en la lando de Nordo Ameriko, iliaj fratoj kaj fratinoj en Usona kaj Kanado deziras ke ili unuigu kun tiu ĉi ligo por ke helpu la igon de paco inter a popoloj dividitaj.

Doktoro Yemans, U. S. A., la bona kaj fama samideano kiu havas grandan intereson pri la Filipina Esperantista Asocio, estas oficisto en la konsilanta komitato de tiu ĉi ligo.

La Honoraj Prezidantoj estas M. Edmond Privat de Geneva, Svisujo, la fama juna Esperantista paroladisto, kaj Winified Sackville Stoner de kvin jaroj, kiu estas la plej juna persono en la mondo havanta Esperantistan diplomon. La prezidantoj estas Sinjoro Frind de Kanado kaj Sinjoro Fisher de Pittsburgh, Pa.; la sekretario estas Fraulino Ninde de Elgin; la kasisto, Sinjoro Brown de Providence, R. I., la propagandistoj, Sinjoro Graham de Buffalo, N. Y., kaj Sinjoro Powers de Louisville, Ky.

Tiuj ĉi gesamideanoj estas tre junaj sed ili havas konsilantan komitaton de saĝaj kaj pli maljunaj geviroj.

La Konsilanta Komitato.

Doktoro H. W. Yemans, U. S. A.
Prof. George Macloskie, D.Sc., LL.D., Princeton University.
Doktoro William Gray Nowell, Boston.
Doktoro D. O. S. Lowell, Roxbury Latin School.
Doktoro James Underhill, Idaho Springs.
Doktoro Walter Fox, Chicago, Ill.
Doktoro Horace Dutton, (la Christian Endeavor World.)
Sinjoro Henry Forman (la North American Review.)
Sinjorino Wilbur F. Crafts, (la Christian Herald.)
Prof. Benedict Papot, Chicago, Ill.
Prof. John E. McFadyen, Toronto, Canada.
Prof. Edwin C. Reed, Rockford, Ill.
Prof. Philip B. Goetz, Buffalo, N. Y.
Prof. Herbert Harris, Portland, Maine.
Prof. C. C. Brilles, Wheeling, W. Va.
Prof. W. B. Sterrett, Sewickley, Pa.
D-ro J. B. Stoner, P. H. & M. H. S.
S-ro E. K. Harvey, Mass. Inst. Technology.
S-ro John Fogg Twombly, Boston, Mass.
S-ro Herbert Scott, Moundsville, W. Va.
S-ro Albert Warrington, Norfolk, Va.
S-ro Harry S. Blaine, Toledo, Ohio.
S-ro Arthur Baker, (America Esperantisto.)

La Filipinaj geknaboj kiuj deziras karton kaj numeron en tiu ĉi ligo, bonvolu sendi 10 cendojn al Sinjoro Sharon Brown, 599 Providence, R. I.

In another letter to this office Mrs. Stoner writes—"I hope that the young people of your society may honor our league by becoming members and when we have our next election of officers during the Fifth International Esperanto Congress at Chautauqua, N. Y. in August, 1909, we want one of the Filipinos for an officer in our league."

"We also have a Woman's Esperanto League as an auxiliary to the E.A. of N.A., organized to help our brothers in making the Fifth International Esperanto Congress a success along religious, literary, social, musical and dramatic lines. As President of this organization I extend a hearty invitation to all the ladies of your society, who will unite with us in our work for the language of peace. The annual dues are but 10 cents and should be sent to Dr. Clara Todson, Elgin, Ill."

Digitized by Google

PREDIKO

dirita de l' abato Pichot, kun la permeso de la Dresdena episkopo, en la preĝejo de la S. Koro de Jesuo (Herz Jesu Kirche) dum la diservo katolika esperantista.

De cetero, Fratres, quæcumque sunt vera, quæcumque pudica, quæcumque justa, quæcumque sancta, quæcumque amabilia, quæcumque bonæ famæ, si qua virtus, si qua laus disciplinæ, hæc cogitate.

Cetere, Gefratoj, kio ajn estas vera, kio ajn estas pura, kio ajn estas justa, kio ajn estas sankta, kio ajn estas aminda, kio ajn estas laudinda, kio ajn estas virta, estu la objekto de viaj pensoj.

Filip. IV, 8.

Karaj Gefratoj,

Fremdulo en via urbo, fremdulo en via lando, parolonta hodiaŭ en tiu ĉi solena cirkonstanco, mi devis serĉi temon sufiĉe vastan, sufiĉe ĝeneralan por interesi ĉiujn katolikojn kaj eĉ ĉiujn religiajn animojn. Nu, mi ne povis elekti temon de medito pli taŭgan ol tiu ĉi programo, kiun la apostolo proponas al la Filipanoj, kaj kiu estas la programo de ĉiu vera katoliko, de ĉiu vera kristano kaj bone komprenigas nian partoprenon al la esperantista movado:

Kio ajn estas vera, kio ajn estaŝ pura, kio ajn estas justa...

estu ĉiam la objekto de viaj pensoj:

Tial mi intencas analizi rapide antaŭ vi la penson de la apostolo pri vereco, pri pureco kaj pri juŝteco, por poste sintezigi kaj resumi ĝin en tio, kio estas la vera kristana idealo kaj la volo de Dio, de Jesuo Kristo pri la homaro, kiel ĝi aperas per la preĝo de nia Savinto la antaŭan tagon de lia morto, tio estas la unuigo de ĉiuj homoj en la vereco, en la juŝteco, en la paco, en la amo, en la pureco kaj sekve en la sankteco.

Sed, antaŭ ol eltrakti tian ampleksan temon, mi deziras esprimi mian dankemecon al ĉiuj, kiuj bonvolis prepari la sukceson de tia bela religia ceremonio.

Unue mi sendas, kun ĉiuj Esperantistoj, miajn respektplenajn dankojn al Lia Reĝa Moŝto, alta protektanto de nia kongreso kaj de nia movado. Ni preĝas, por ke Dio benu Liajn sindonajn penadojn por la ĝenerala paco kaj bono.

Mi dankas koregе Lian Moŝton Mgnoron Schæfer episkopon dresdenan, kiu permesis nian diservon kaj tiun ĉi predikon. Mi dankas la respektindan paroĥestron de tiu ĉi preĝejo, kiu nin tiel afable akceptas.

Mi dankas ĉiujn, kiuj kunlaboris por bone ordigi tiun ĉi kunvenon kaj precipe la lertajn artistojn kaj artistinojn, kiuj igis ĝin tre interesanta kaj vere artoplena. Mi ne povas danki ilin nome, sed ili laboris por la gloro de Dio. Ili havas jam premion en la sukceso atingita kaj havos alian pli grandan, de Dio mem iam.

Fine ni sendas tre specialan dankon al la Pastro de la Pastroj, kiu sendigis al ni sian patran kaj karegan benon. Ni preĝos, por ke li sukcesu plenumi en la kristana societo sian pacan kaj unuecigantan misio.

I

La unua objekto de la penso kristana lau S. Paulo estas la vero, la vereco; ni devas pripensi veron, nin okupi pri vero: "kio ajn estas vera... estu objekto de viaj pensoj."

Vero estas ofte nezorgita kaj eĉ malŝatata en la homaro: Vi memoru tiun detalon de la S. Evangelio: Jesuo estas antaŭ Pilato kaj solene diras: "Mi naskiĝis kaj venis en la mondon por atesti pri la vero. Ĉiuj audas mian voĉon, kiuj amas veron." Sajnas, ke ĉiuj devas atenti... Ne, Pilato indiferenta kaj preskau blasfemanta demandas: Kio estas vero?... Ho! Kiom da homoj ĉiutage, audintaj paroli pri vero, diras ankaŭ interne au laute: Kio estas vero?

Certe ni estas, kiel la roma oficisto. Ni iomete pensas pri vero. Sed ĉu ni sufiĉe komprenas nian devon al vero? Ĉu ni estas ĉiam pretaj obei, sekvi la plej malgrandan fajreron da vero, kiu montriĝas al ni? Ĉu ni scias bone, kio estas vera kaj kiel atingi ĝin?

La vero, karaj gefratoj, estas por nia animo, kiel nutrantajoj por nia korpo, kiel la aero por niaj pulmoj. Ĝi estas por nia intelekto, kiel la lumo kaj la koloroj por niaj okuloj, kiel la sono au pli bone bela muziko por nia orelo, kiel delikata plado por nia gusto, aŭ kiel dolĉega parfumo por nia flaro... mi povus daurigi tiajn komparojn.

En ni mem ĝi estas ia simileco, konformeco inter niaj ideoj kaj la relajoj.

En la kreitajo ĝi estas ia interrilatiĝo inter la ajoj kaj la kreinto, eterna tipo kaj modelo de ĉio, kio ekzistas. La vero estas Dio mem, en kiu la ideo kaj la realajo sin

Digitized by Google

reciproke egalas. Jesuo Dio-homo povis diri: mi estas vero, *ego sum veritas*. Sekve honori veron, ami veron estas honori Dion, ami Dion.

Do la apostolo estis fortege prava, kiam li konsilis, ke ni nin okupu pri vero, ke ni pensu pri vero: *quæcumque vera... hæc cogitate*. Ni devas ami veron, honori veron, serĉi veron ĉiel kaj ĉiam, diri veron, memorante la parolon de la Sankta Skribo: ĉiu diru veron al proksimulo, *loquimini veritatem unusquisque proximo suo* (Zak. 8, 16. Eph. 4. 2). Kaj: estu via parolado: estas, estas; ne, ne, *Sit sermo vester est, est, non, non*. (Matth. V, 37.)

Ni devas honori kaj respekti ĉiujn organojn de vero:

La Sanktan Eklezion, kiu estas la kolono kaj fundamento de vero: *columna et firmamentum veritatis*, kiu estis figurata per Jeruzalemo, pri kiu profeto diris: ĝi estos nomata la civito de vero: *civitas veritatis vocabitur*. (Zach. VIII, 3.)

Ni devas audi kaj sekvi nian racion, nian konsciencon, kiam ili instruas nin veron, kiam ili kondukas, direktas nin al la vero. Ni devas respekti la sciencon, kiam ĝi estas bona uzo de nia racio, kaj kiel organon de vero, helpilon por atingi veron.

Certe hodiaŭ, gefratoj, multaj amas kaj zorge serĉas veron, sed grave estas ankaŭ la maniero ĝin serĉi. Multaj zorge ĝin serĉas sed nur parte. Sajnas, ke ili ne deziras ĝin tro plena. Spiritoj detalesploremaj kaj tro analizemaj, ili perdiĝas en la polvo de la detaloj kaj neniam admiras la belecon de la tutaĵoj; *ĉiam lernantaj kaj neniam veron atingantaj*, diras pri ili la apostolo... (II, Tim. III.)

Aliaj ne volas praktiki veron, sed volus nur admiri ĝin. Tiuj ankaŭ ne sufiĉe amas veron. Ĉar vero estas aminda ĝis la praktiko, ĝis la sindono. Ve! al tiu, kies sciaĵoj ne sanĝiĝas en amon, diras Bossuet.

Fine kelkaj elspezas siajn fortojn, siajn noktojn en la serĉo de vero, sed ili ne sukcesas, ĉar ili serĉas ĝin nur per sia intelekto, anstataŭ per sia koro, per sia tuta animo. Ni devas serĉi veron, kiel ni serĉas Dion mem, *in simplicitate cordis quærite illum*, kun simpleco kaj tuta animo.

II

Post la vero, la pureco devas esti objekto de niaj pensoj: "Kio ajn estas pura, estu la objekto de viaj pensoj."

Certe la S. Apostoloj bezonis iom da kuraĝo por prediki ĉiam, kiel ili faris, la purecon, al la idolanoj. Estas ankaŭ bela spektaklo aŭdi Eklezion senĉese ripeti la parolon de sia fondinto: Feliĉaj tiuj, kiuj havas puran koron, ĉar ili Dion vidos: *beati mundo corde quoniam Deum videbunt*. Estas pli bele, vidi niajn legiojn de virguloj audintajn lian voĉon kaj sekvantajn sian modelon...

Lacordaire estis prava, kiam li diris, ke la pureco, je unu grado kaj ĝenerale, estas virto rezervita, vere rezervita al la amantaj Jesuon...

Vi memoru niajn sanktulojn, ekzemple S. Jeromion forlasantan la brilaĵojn de Romo por iri Bethleemon, centron de simpleco kaj peruco...

Nu, la malpureco estas la granda malhelpo, malamiko de vero. La homo, kiu serĉas precipe kaj ekskluzive la voluptojn de la karno, forgesas necese la ĝuojn de l' animo, forgesas la veron, preterlasas eĉ la sciencon, perdas tutan indecon, kaj fariĝas tiel diras la Sankta Skribo, simila al la ŝarĝbestoj. (Ps. 48, 12.)

La dogmo de la graco, laŭ kiu Dio mem travivas en la homa animo kaj sanktigas eĉ nian korpon, igas purecon samtempe pli necesa, pli taŭga kaj pli facila: "Vi ne nescias, ke viaj membroj estas la templo de la spirito sankta." (I, Cor. VI, 19.)

La scienco aldonas helpon por la praktiko de la pureco, montrante, ke nia korpo estas mirinda ĉerĉverko de Dio, kaj tuŝigante la terurajn ruinigojn de la malpureco.

Tial ni devas, en la nuna societo, ĉie, ĉiam, memori niajn honorajojn, batali en ni mem por konservi tiun doublan, naturan kaj supernaturan belecon, kiun Dio donis al ni, batali ekstere kontraŭ la senbrideco de la pasioj, kontraŭ ĉio, kio estas malpureco kaj malaltigo de la homo aŭ malbonuzo de la bonfaroj de Dio, kontraŭ ekzemple la alkoholismo, la malvirtiĝo de la junularo per la presaĵoj, por la ĉasteco, pureco, sobreco, tiu ĉi kardinala kristana virto, kiu sola fortigas, virigas, kaj beligas homon: *Quæcumque pudica... hæc cogitate*.

III

La kulto de vero altigas homon kaj proksimigas lin al Dio, el kiu ni venas, al kiu ni iras, en kiu ni estas: *in ipso vivimus, movemur et sumus*. (Art. XVII, 28.)

La pureco nobligas nin kaj perfektigas nin, ĝi kreskigas nian belecon, nian feliĉon kaj nian kapablecon al feliĉo. Sed la homo vivas kaj devas vivi en societo. Vero kaj pureco ne koncernas rekte la socieron. Tial S. Paulo aldonas tuj: "kio ajn estas justa... estu la objekto de viaj pensoj."

Justeco estas efektive necesa fundamento de la societo, de la amo frata por niaj similuloj, la sola regulo de la rilatoj inter

Digitized by Google

la homoj, inter grupoj de homoj, kaj, lau la Skribo, inter nacioj: justeco altigas naciojn. Ĝi estas kelkmaniere la realigo praktika de vero. Ĝi estas la sola solvo de la sociaj problemoj. Nenio ofendas nin tiom, kiom la maljusteco...

Ni do havu ĉiam en la penso tiun ĉi ordonon, principon de la justeco kaj de l' amo: ni faru al aliaj tion, kion ni volus, ke oni faru al ni: kaj ni ne faru al aliaj, kion ni ne volus, ke oni faru al ni.

Ni memoru, ke nia Dio estas Dio de justeco, kies justeco dauros eterne, kaj ke ni devas celi la perfektecon de nia Patro ĉiela...

Sed, Gefratoj, mi devas rapidi por ne trouzi vian paciencon kaj atenton. La penso de la apostolo ankau rapidas, kiam li konkludas: "Kio ajn estas sankta, kio ajn estas aminda, kio ajn estas laudinda, kio ajn estas virta estu la objekto de viaj pensoj..."

Mi enlimigos min, rimarkigante al vi, ke ĉiuj konsiloj de la apostolo estas plenumitaj en la Vivo de la Sanktuloj kaj sekve en la sankteco, kiu estas la disigo de la kreitaĵoj kaj la unuigo, la similiĝo al Dio.

Nu, la aro de la sanktuloj kaj de ĉiuj, kiuj penadis por la sanktiĝo, formas la sanktan Eklezion, edzinon senmakulan de Kristo, kiun oni difinas precize: la aro de ĉiuj animoj, kiuj amas kaj amis Dion.

Tiel vi vidas, ke la Eklezio aneksas ĉion, kio estas bona, aminda, laudinda, virta, kaj plenumas la konsilon de l' apostolo. Ĝi akceptas ĉiujn rektajn, sincerajn animojn. Tiel ĝia animo transiras la limojn de sia korpo. Ĝi estas vere la universala Societo, pri kiu parolis Gratry. Ĝi unuigas la tutan homaron en la sankteco, en la bono, en la plej malgranda penado por la sankteco, per la ligiloj de la preĝo frata, de l' amo reciproka, de la sama kredo en la unueco de Vero, per la praktiko de la samaj ordonoj kaj virtoj, per la sama komunio al la samaj fontoj de graco.

Ĝi superas eĉ la limojn de la tero kaj de la tempo, ĉar ĝi unuigas la homaron nunan kaj pasintan.

La unuigo de la homaro estas do parte jam plenumita unue en la unueco de speco, kiun ni kredas, kaj kiun la apostolo proklamis antau la aeropago: *fecit ex uno omne genus hominum*, due en la unueco de la fido Kristana ĉie predikita. La unuigo estas tiele plenumita en la du ekstremajoj de la homa naturo fizika kaj spirita.

Restas plenumota au plidensigota la unuigo politika. Tio estos la verko de Dio per niaj penadoj, per la scienco, per ĉiuj iloj de komuniko sur la tero, per la fervojoj, la telegrafoj, baldau per la flugmasinoj, per la lingvo internacia, kiun mi uzis hodiau en tiu ĉi katedro.

Por atingi tiun celon, kiel la Eklezio alprenas ĉiun bonan volon kaj uzas ĝin, tiel la sindonaj homoj, kiuj jam akceptas la unuecon de la homa speco kaj ĝiajn sekvojn, kiuj entuziasme parolas pri la homa frateco, forgesante eble la ideon korelativan de la dia patreco, devas akcepti la realaĵon de la Eklezio, mirinda internacia institucio, semo de paco, potenca ligilo. Ĝi estas la daurigo de tiu, kiu estis nomita de la profeto: Princo de la Paco—*princeps pacis*—pri kiu la apostolo diris: Li estas nia paco: *ipse est pax nostra*. Pro tio la Eklezio estas inda je atento... Per la kunlaboro de ĉiuj, oni sukcesos...

Tiam plenumiĝos la bela peno de unu el viaj pensistoj Leibniz, kiu elpensis la kalkulon infinitesiman kaj penadis por unueco de la nacioj per la lingvo internacia, per la interdependeco de la spiritoj sub la patronado de la kristana fido. Tiam plenumiĝos per la scienco, per la paco, per la justeco la civito de Dio sur la tero priskribita de Isaio kaj S. Augustino.

Tiam el ĉie supreniros solena hosano al la gloro de Dio, kiu anoncos kaj preparos la hosanon de la ĉiela civito, ĉe kiu Dio estos ĉio en ĉiuj: *Deus omnia in omnibus*. (I, Cor. XV, 28).

D-RO H. W. YEMANS

The excellent likeness of our president appearing on our first page is from a crayon drawing by the talented Filipino artist, Sr. M. A. Torres.

In his last letter he enclosed the following lines for publication in acknowledgement of his election.

Fort Wayne, Detroit, Mich.,
Usono, la 24an de Octobro, 1098.

Al la Anaro de l' Filipina Esperanta Asocio:—Mi ŝatas multe la honoron kiun vi faris al mi, elektinte min kiel via prezidanto, kaj, kvankam mi forestas la kampon de viaj laboroj, fari pli intimajn la interrilatojn internaciajn de l' tuta homaro, mi ne estas maldiligenta, nek malutila mi esperas, je la klopodoj de l' tuta Esperantistaro, rilate al tiu celo.

Ni do laboradu al tiu celo, fari la tutan homaron de l' terglobo unu grandan rondon familian, konvinkitaj ke, je iu belega ĝoja tago, se ne ni, niaj postvivantoj, povos sin nomi, ĉiu, fratoj al ciuj aliaj.

Esperante ke vi, ĉiuj, ne laciĝos je la laboro, kunfratigi la tutan homidaron, en ĝia plej vera kaj plej bela senco, kaj pli alta celo ne ekzistas, mi estas, kun samideanaj salutoj al ĉiuj,

Frate la via, H. W. YEMANS.

Digitized by Google

LA NIGRAHARARA ALINDA

Filozofia Rakonto.

I

Platono diras, ke ni similiĝas al tio, kion ni elrigardadas. Poe bele priskribas sian eksenton pri ĉi tiu granda spiritleĝo. En unu el liaj rakontoj sin trovas tiuj ĉi vortoj: "Mi estas estinta mian tutan vivon komercisto de antikvaĵoj; mi estas sorbinta la sombrojn de falintaj kolonoj ĉe Babalik kaj Tadmor ĝis tiu grado, ke mia tuta animo estas iĝinta ruino." Lamartine ankaŭ eksentis la ekziston de tiu leĝo; alie, li ne dirus: "La grandaj fanatikuloj ĝenerale deveniĝas de malĝojaj kaj senfruktaj landoj." Estis ĉiam misterio al mi, kial li faris sian dirajon tiel limita; li estus devinta fari multe pli ampleksan ĝeneraligajon; li estus devinta diri, ke ĉio similiĝas al tio, kion ĝi elrigardadas. Estas la naturo de ĉiu estajo kaj ĉiu objekto fari spiritan komercon, interŝanĝi individuecojn.

Eĉ se vi ne povas kredi kun mi, ke estas la emo de la nuboj similiĝi al la montoj cirkaŭe de kies altegaj suproj ili tordas siajn senmakulajn brakojn, aŭ la sunleviĝoj al la ruĝgorĝoj, aŭ la oraj steloj al la trankvilaj herbejoj, vi nepre devas konfesi, ke estas la emo de la animoj similiĝi unu al la alia.

Du personoj ne povas renkontiĝi sur la strato sen la efektiviĝo de ia individua interŝanĝo de la ambaŭa personeco: unu el ili similigas sin iomete al la alia; du personoj interparoladas, kaj pro tio mem ilia estonta vivo estas jam ŝanĝata. Ĉu vi neniam observis la similecon inter tiuj ĉi viroj kaj virinoj, kies reciproka kaj neŝancelanta amo de la unu por la alia estas brulinta jam depost multaj jaroj, kiel la stelaj lumoj? Ĉu vi neniam observis, ke kiam unu el ili mortas, ofte la alia baldaŭ sekvas? Tiu ĉi disiĝo de la anima materio de la korpa okazas preskaŭ samtempe ĉe ambaŭ, ĉar, kiam unu mortas, ĉu ne mortas ankaŭ parto de la alia?

Ĉiam, kiam oni faras malbonajon al aliulo li makuligas la tutan homaron; kiu sicas, ĉu li kuntrenas iomete kun si eĉ la tutan universon? Kiam krimo estas farita, kvankam estas nekonata la kulpulo, leviĝas malakordo en la muziko de la plej malproksima stelo kaj subita, forta doloro sentiĝas ĉe la brusto de la ĉefanĝelo apud la trono de la Ĉiopovanto.

II

Ie estas kastelo, kiu majeste suprenleviĝas de grandega ŝtonegaro ĉe la kunfluiĝo de du vivegaj riveroj; la tuta pejzaĝo estas konfuzo de ŝtonoj kaj krutaj intermontajoj, kaj la horizonto estas kvazaŭ difektiĝita tranĉrando de ia segilego, tiel ĝi estas cirkaŭata de malgajaj montoj, kies nigraj suproj ŝajnas piki la ĉielon. Oni dirus, ke la Naturo elspriris sian lastan spiron dum ĝi estis suferanta la efikojn de la epilepsio, kaj ke la morto faris nenian ŝanĝon en ĝia tordigita vizaĝo; severa energio kaj teruriga vivo devenas de ĉio ĉi.

La kastelo enhavas pli, ol tridek ĉambrojn, sed, esceptinte du el ili, neniu nuntempa estajo neniam eniris ilin; ili ne malfermiĝis jam de multaj generacioj. Tiuj ĉi du ĉambroj estas en turo cent piedojn supre de la saŭmaj riveroj; du malgrandaj fenestroj, kiel la fenestretoj de krozŝipo, malfermas al la ŝtonplena pejzaĝo kaj la nigraj, misteraj montoj.

Estis varmega nokto kaj la ĉielo estis kovrata per tumultaj nuboj kaŝantaj la blankan lunon. Neĉesantaj estis la fulmoj kaj ili ŝutadis tra la ĉielo, kiel grandegaj sangaj serpentoj; laŭtege krakadis la tondro kaj la kastelo tremadis de la fundajo ĝis la pinto; tamen, ne pluvis: la ĉielo ŝajnis kvazaŭ doloregita koro, kiu me povas plori.

Estis lumo en la orienta ĉambro de la turo kaj interne du vivantaj estajoj, jes, homaj estajoj, maljunulo kaj junulo. Longaj estis la barbo kaj la hararo de la maljunulo kaj sia vizaĝo estis blanka kaj trankvila. Li sidis apud antikva kameno, kantanta kanton kaj ludanta akompanantan muzikon per violono. Li ludis divine kaj sia voĉo havis superhoman ĉarmigantan dolĉecon kaj la kantataj vortoj estis malĝojigantaj; la jenaj ili estis:

Kiam estas la someraj rozoj plej dolĉaj?
Tiam, kiam ĝia dolĉo jam foriris.
Kiam estas la someraj ĉieloj plej belaj?
Tiam, kiam ĝia lumo jam forflugis.

Strange estas, ke ni neniam ŝatas
Florantajn rozojn au belegajn ĉielojn
Ĝis tiam, kiam la roza dolĉo jam foriris,
Ĝis tiam, kiam la somera lumo jam forflugis.

Digitized by Google

Kiam estas la estantaj horoj plej esperplenaj?
Tiam, kiam ĝiaj esperoj jam forflugis
Kiam estas la geamikaj vizaĝoj plej amataj?
Tiam, kiam tiuj ĉi geamikoj jam mortis.

Strange estas, ke ni neniam ŝatas
Feliĉajn horojn aŭ amantajn okulojn
Ĝis tiam, kiam la feliĉaj horoj jam foriris,
Ĝis tiam, kiam la amantaj okuloj jam mortis.

Estis maldika la junulo kaj sia vizaĝo, malĝoja kaj timigite palega. En siaj grandaj, grizaj okuloj ekvidiĝis suferoj preskaŭ kruelegaj; malordigita estis sia hararo kaj, kvankam la vestaĵoj, kiujn li surportis, estis multekostaj, ili sin trovis malpuraj kaj nezorgitaj. Simila al vulpo, li estis promenanta tien kaj tien ĉi en la duone lumigita ĉambro. Dume la maljunulo estis kantanta la malĝojajn versaĵojn de sia malgojiga kanto, la okuloj de la junulo iĝis pli teruraj kaj siaj paŝoj, pli rapidaj. Tiu jam estis kantanta la lastan linion, kiam tiu ĉi interrompis lin per ĉi tiuj vortoj: "O, patro mia, ĉesu vian muzikon. Kiel estas la ruĝaj fulmoj al tiu ĉi nokto, tiel estas viaj vortoj al mia memoro. La pejzaĝo de la estinteco estas relumigata kaj ĉiuj siaj detaloj ekbrilĝas en mian memoron, kiel ponardo en la koron. Kien aliras la mortintaj tagoj? Ne estas reviviĝo por ili? Aŭ se ili estas neniigitaj, ĉu Dio ne havas povon rekrei ilin, ne aliajn similajn je ili, sed la samajn, amegitajn tagojn? Kiam la memorigoj ĉesos turmentigi nin? Ĉu la mortintoj ankaŭ sentas la dolordonantan jugon de la memoro?"

La maljunulo demetis sian violonon kaj apoganta sin kontrau sian brakseĝegon, li fiksis la okulojn sur sian filon. Kiam la strangega parolado finiĝis, li respondis lin malrapide kaj kviete, sed en la malrapideco kaj kvieteco de siaj vortoj kuŝiĝis submetita koloregigo: "Filo mia, estas kun malĝojeco kaj kordoloro, ke vi vidas la vojon, kiun vi sekvas. Kiel la sovaĝa ĉevalo skuadas la roserojn de sia kolhararo, tiel vi devas skuadi de vi ĉiujn ĉagrenojn; jam alvenas la horo, ke vi agu kiel matura viro. De via naskiĝo, mi esperis, ke vi iam scios fari nian familian nomon fama inter la homoj. La naturo donacis al vi kapablecojn neordinarajn, sed, ho ve! vi ŝajnas malforta kaj malkuraĝa? Ĉu vi intencas treni vin tra la vivo ĉiam pripensanta infanaĵojn? Baldau mia pacienco konsumiĝos kaj la patra indulgo ĉesos esti virto. Vi devas adiaŭi vin al mi, aŭ montrigi vin pli brava." Al ĉio tio ĉi la filo respondis: "Pli brava, pli brava. Kial do mi devus esti pli brava? Kion mi havas, kiu incitus min batali? Se mi ambicius la gloron kaj ŝanceliĝus en la barakto por havigi la premion, tiam mi estus malkuraĝa; sed, kiel mi povus entuziasmiĝi pri la persekutado de tio, kio nenzas min? De miaj pli junaj jaroj mi sentis la terurigan malplenon de tiu ĉi mortema vivo. Patro, vi ne komprenas min. Neniam estis pli ol unu, kiu min komprenis. Ho, ĉu neniam mi povos impresi pasioplenajn kisojn sur la rozkolorajn lipojn de la Nigraharara Alinda, aŭ ĝui la ravegigajn ĉirkauprenojn de ŝiaj anĝelaj brakoj? Estas interne de mi io, kiu diradas al mi: "Neniam plu, ne eĉ en la eterneco." Tuta mia konscienco estas superfluita je ŝi kaj ĉiu fragmento de mia koro portretas ŝian imagon lau ĉiuj ŝiaj sangoplenaj fibroj. Kiom ajn granda estus mia malamo al la mondo, ne ekzistas murego, kiun mi ne povus surrampi, se nur sonadus je la atakego la trumpeto de ŝia amo. Ho, patro, Agassiz nur per unu skavamo povis spirite rekrei la fiŝon el kiu ĝi devenis. Do, pro miaj vortoj, konu min, komprenu min."

Dum la filo dauradis sian paroladeton, la vizaĝo de la maljunulo pli kaj pli serioziĝis, kaj kiam li finis, la patro respondis:

"Kompreni vin? Mi vin komprenas pli bone ol vi komprenas vin mem. Ĉu homa ne estas la Nigraharara Alinda? Mi ne kulpigas vin, tial ke vi amis ŝin, sed nur ĉar vi ne estingis vian aman flamon. Kion vi supozas esti via amo? Mi tion diros al vi: ĝi estas la soifo al la eterna beleco de nemortemaj objektoj, kiu tormentas ĉiun animon, kaj speciale tian, kian vian. Vi faris ŝin via idealo, via sankta idolo, via senkomparebla perfektmodelo. Tiaj ŝi ne estas al aliuloj. Neniam ŝi povos esti via, eĉ ŝi estus la anĝelo, kiun vi imagpentras ŝin; tio neebla estas, ĉar inter vi kaj ŝi oscedegas profundajo je ĉiam netransirebla al vi. Pli racie estus, ke vi celus la posedadon de stelo. Prudenta estas tiu, kiu senproteste kliniĝas antau la neevitebleco. La vivo estas tro mallonga por pasigi ĝin ĉiam bedaŭrante. Tuj ŝanĝu vian vivmanieron, alie ni disiĝos. Promesu al mi, ke estonte vi venkos ĉiujn viajn malfortecojn. Mi vin amas. Ĉio, kion mi posedas estas al via dispono. Promesu, ke vi penos elstreki el via konscienco la imagon de la Nigraharara Alinda. Promesu al mi tion, alie ni disiĝu."

La filo respondis: "Mi vin amas, patro mia; volonte mi demetus por vi mian propran vivon, se estus necese, sed tion, kion vi postulas al mi, mi ne povas fari; mi ne povus, eĉ mi volus, mi ne volus, eĉ mi povus; la rememoro pri ŝi, meze de mia ega malĝojo, estas certamaniere mia

Digitized by Google

sola ĝojo; ĉu vi forprenus de mi mian solan ĝojon?"

Ĉe tiuj ĉi vortoj, la okuloj de la maljunulo pleniĝis je kolorego, sed lia respondo estis malrapida kaj kvieta, tamen ĝia malrapideco kaj kvieteco igis lian rigardon pli teruriga. Li leviĝis de la seĝego kaj tiele parolis: "Tio ĉi, do, estas la rezultato de ĉio, kion mi faris por vi. Estas bone. Ĝi estu tia. Morgaŭ mi foriros. Neniam mi revenos. Tiu ĉi kastelo apartenos al vi. En tiu kesto vi trovos oron. Mi ne lasos vin malriĉegita. Mi ne volas puni vin. Vi estos via Nemeso, via propra punanto. Iam alvenos tago, kiam vi bedaŭros ne esti obeinta min, * * * ne en tiu ĉi mondo, sed en la alia. Mi vivis pli longe ol vi; konsekvence, mi plion scias ol vi. Sekvu la diktatojn de via sklaviganta obstineco. Gardu la imagon de la Nigraharara Alinda, kaj iun tagon via konscienco estos al vi infero; gardu la imagon de la Nigaharara Alinda kiel plej valora trezoro, fiksu sur ĝin vian rigardadon, kaj se nur ĝi daŭros kun la sama egeco kiel nuntempe, pli malfrue vi perdos vian animon; tamen vi kredeble ne eksentos ĝin perdigon, ĉar terurige sennuba estadas la ĉielo de la animo, kiu vojiradas al la neniiĝo; sed vi perdos vian animon."

III

Estis belega tago de l' monato oktobro, unu el tiuj ĉi tagoj en la ĉeesto de kies ravigaj horoj ŝajnas al ni malriverenco priokupadi nin pri niaj ĉiutagaj aferoj,— unu el tiuj ĉi tagoj kiam, pro eksteraj influoj, ni eksentas nin superaj al ni mem; tamen la avaraj homamasoj en la centro de granda urbego nur sciis, ke la ĉielo estas sennuba kaj ke la suno belege brilas; ili estis tro okupataj je la persekutado de ombroj, por ke ili povu ekŝenti la ekziston de substancoj. Ĉio, kio estas efemera haviĝas nur per ŝvito kaj penadoj. La senmortaj estajoj apartenas al neniu. Ĉio, kio estas eterna kaj glorinda en la universo, estas senĉese frapetanta ĉe la koro de la homo, petegante la eniron; sed la homo ne auskultas, preferante esti sklavo de la nedaŭrajoj kaj pereemajoj.

Estis belega tago de l' monato oktobro, kaj viro estis mortanta en mizera budo sur mallarĝa senelira strateto ĉe la centro de granda urbego. Li estis sola, sed ne mankis al li kompanio, ĉar li estis kun si mem. Estis vespere kaj la mano de la Morto subpremis lin depost la mateno; tamen kun superhoma ekpeno li sukcesis levigi sin de sia lito de malpuraj, ĉifonitaj tolajoj; apud li kuŝis malmola panbulo duone manĝita: estis la tuta nutrajo, kiun havis dum kelke da tagoj. Se vi estus trapasinta tiun solecigitan seneliran strateton kaj estus rigardinta la vizaĝon de tiu viro, tra la malpuregaj vitrajoj, vi ektremetus je ĝia rememoro, eĉ post jarcento. En siaj blankaj kaj konsumiĝintaj manoj li preme tenadis speguleton, kaj rigardadis en ĝin per pacia adorado, kiu briligis liajn pro la rapida proksimiĝanta morto vitrecigitajn okulojn. Estas la sama stranga junulo, kiu promenis tien kaj tien ĉi en la orienta ĉambro de la turo. Li havas la saman malordigitan hararon kaj en lia vizaĝo vidiĝas la identa paleco dubeflave koloregita anoncanta la proksiman disiĝon de korpo kaj animo. Sed kiel ŝanĝita li estas! Lia vidiĝo estas surprize virinseksa; liaj lipoj similiĝas al tiuj de virgulino; lia antaŭe blonda hararo nun estas nigriĝinta; liaj okuloj estas grandaj, nigraj kaj brilaj.

Kion le vidas, kiu frenezigas lin per la ravo de nesatebla adorado? Li estas rigardanta la Nigrahararan Alinda'n.

Dum dudeko da jaroj li estas gardanta ŝian imagon en sia konscienco, dum dudeko da jaroj li estas sorbiginta ĝin senĉese. Kia estas fine la teruriga rezultato? Lia spirito tiel estas similfariĝinta al la ŝia, ke ne nur en la vizaĝo de la junulo ŝi vidiĝas, sed ankaŭ la figuro de la kapo kaj koloro de la hararo estas kiel la ŝiaj. Li mortos en la daŭro de unu plua horo, kaj ĉu li ŝin adorados malmulte tiam, ol nun? Ĝu tiam li trovos plezuron for de si mem, ne povante tion fari nun? Ne; li estas adoranta sin mem; li estas tute igoismo; lia animo nepre devos perdiĝi.

De angla lingvo, esperantigis,
EDGAR A. MCCLELLAN.

RAPORTETO.

La jus aperinta numero 3 de la Leipziga "Spritulo" montriĝas multe pli perfecta ol la du unuaj. La titola paĝo alportas komikegan bildon pri la Esperanto-vilaĝo malsukcesinta "Weisser Hirsch." Impresega estas belega bildo pri perfido kontraŭ nia majstro. La bone ilustrita humorajo: "la kvietigistino" same kiel la ĉarmega satiro "Antipelino" estas ambaŭ treege legindaj.

Communications addressed to Great Britain should not have the stamp in close proximity to reading matter it being contrary to regulations; the propaganda stamp borders issued by us should therefore not be put on mail addressed to the United Kingdom.

Postage stamps must be stuck on the proper side (address side) on postcards directed to Germany and Gt. Britain.

Digitized by Google

POLICASOCIO ESPERANTISTA

Al Redaktoro "Fil. Esp."

Estimata Sinjoro:

Sciante la intereson kiun vi alportas al la kauzo esperantista kaj precipe al la enkonduko de Esperanto en la policon, ni havas la honoron altiri vian atenton sur la jenan leteron:

Nia prezidanto, S-ro Miguière, prezentigis ĉe la speciala kunveno de la policistoj, dum la dresdena kongreso, la sekvantajn projektojn:

1e Fondo de POLICASOCIO internacia.

2e Fondo de internacia bulteno polica kiu estus la oficiala gazeto de POLICASOCIO.

Ni estis tre honorigataj koni la favoran akcepton kiu estis farata al liaj proponoj.

Ni do opinias ke alcentrigo en Parizo de niaj samprofesiaj grupoj helpus sukcese por la propagando de niaj ideoj kaj por la formado de similaj kluboj en la mondo. Oni informis nin pri la baldaŭaj fondoj de novaj kluboj en la mondo kiuj pli grandigos la nombron de la nunaj (Stockholmo, Dresdeno kaj Parizo.)

Do ŝajnas al ni utile fondi nune tiun centroficejon kiu povos esti la sidejo de la estonta POLICASOCIO ESPERANTISTA el kie ni sendos alvokojn al la diversaj policoj.

Nia Klubo estas preta por helpi plej eble tiun propagandon kaj nia administracio, kiu allasis al ni kunvenejon en la prefektejo, interesiĝas pri nia afero kaj observas nin bonvolece. Sinjoro Bertillon, la mondkonata policano, estro de la antropometriejo, estas honora ano de la POLICA KLUBO ESPERANTISTA DE PARIS.

Por ebligi al ni starigi staton de la disvastiĝo de Esperanto en nia internacia anaro, ni petas viu sendi al ni:

1e Nomojn aŭ nombron de la policanoj el via Klubo; iliaj oficoj en la grupo kaj en la polico. Montri la esperantistojn kiuj deziras korespondi kun fremdaj policistoj kaj la honorajn anojn.

2e Nomojn de la izolataj esperantistaj policanoj de via lando kiuj estas pretaj por fariĝi korespondantoj por la policaj aferoj. Konigi al ili nian iniciativon.

3e Regularon de via grupo.

4e Nomojn de la policanoj al kiuj oni povus sendi alvokon sukcese.

5e La proponojn kiujn vi prezentas.

6e Atendante la kreon de polica bulteno, la sendon regulan (1a Januaro, 1a Aprilo, 1a Julio, 1a Oktobro) de letero enhavanta respondan poŝtmarkon, en kiu vi prezentos: la progresojn, de l' afero en via polico; la personojn al kiuj ni povus sendi alvokojn kaj la sciigojn kiujn vi konis pri nia entrepreno.

7e La bonakcepton kiu povus esti farata pli malfrue en via polico al internacia polica bulteno en kiun ni enmetus la hom-signalarojn de la krimuloj kiuj forkuris en fremdajn landojn.

Nia grupo prenos sur sin la sendon de la alvokoj kaj respondos pri la leteroj kiujn vi sendos al ni. Tiamaniere ni bone konos niajn prenojn kaj venkojn povante starigi tabelon de la policoj kie nia Zamenhofa lingvo povas esti utiligata. Ni kune laboros por la triumfo de nia humana celo kaj havos helpilon por koni nin.

Esperante ke vi certe bonvolos respondi al ni kiel plej eble proksime por povi sendi baldaŭ al vi sciigojn internaciajn, ni havas la honoron sendi al vi kaj al la samideanoj de via bela lando, korevarman saluton.

Polica Klubo Esperantista de Paris.

REGULARO DE POLICA KLUBO ESPERANTISTA DE PARIS.

Grupo de oficistoj de polica pariza prefektejo estas fondita. Ĝi havas la nomon POLICA KLUBO ESPERANTISTA DE PARIS.

Ĝi celas:

1e Propagadi la lingvon helpan Esperanto en ĉiuj oficejoj de la polica pariza prefektejo.

2e Faciligi la uzadon de tiu lingvo por la internaciaj policaj rilatoj, precipe per la verkado de speciala terminaro

3e Kunhelpi por la fondo de la INTERNACIA POLICASOCIO.

Ĝi partoprenos en la INTERNACIA POLICASOCIO kiu nun fondiĝas.

La societa sidejo de tiu klubo estas en la Polica Prefektejo.

La grupo tute malpermesas al si ĉiun alian objekton kiu estus malsama je sia celo, kiu estas: la studado, uzado kaj propagando de Esperanto.

Ĝi ankoraŭ malpermesas al si politikajn aŭ religiajn diskutojn.

Ĉiuj oficistoj laborantaj en la Administracio kaj la eksoficistoj povas partopreni kiel aktivaj anoj en la Polica klubo.

La kotizo de la aktivaj anoj estas sen-lima, sed ĝi ne povas esti malpli ol 0,50

Digitized by Google

(20 spesdekoj) ĉiun duonjaron.

La Administracia konsilantaro de la Klubo estas elektata dum ĝenerala kunveno. Ĝi konsistas el dekdu anoj.

La triono el ili estas reelektebla jare. Lote okazas la elektoj.

La administracia konsilantaro elektas sian estraron kiu estas la estraro de la Klubo kaj konsistas el:

Prezidanto; Vicprezidanto; Sekretario; Helpa sekretario; Kasisto; Bibliotekisto.

Tiu estraro estas renovigata ĉiudujare. Siaj anoj estas reelekteblaj.

La Klubo kunvenas unufoje ĉiun nonaton kiam estos eble.

Kiam la Prezidanto ne ĉeestas, la kunvenoj estas prezidataj de ano de la Konsilantaro.

Dum unu el la kunvenoj de la trimonato Aprila-Junia okazas la elektoj kaj aprobo de la kalkuloj.

Esperantaj lernparolado okazas en la speciala ĉambro pruntdonita de la pariza policestro al la Klubo.

Ĉiu ŝanĝo en tiu regularo devas esti aprobata de ĝenerala kunveno.

On the 14th of November, the newly formed San Nicolas Esperanta Klubo held their inauguration meeting. About six hundred people were present well filling the spacious and luxurious residence of Sr. Cecilio López.

The following interesting program was given and much enthusiasm was evoked for the new language. Prominently displayed Esperanto flags and green stars were conspicuous in the decorations.

"LOS ESPERANTISTAS FILIPINOS" Two-Step dedicada á la Sociedad por el socio Sr. Enrique Baltazar, ejecutada por la Orquesta Molina.
Discurso inaugural por la socia honoraria Srta. Pura Villanueva.
"FLUGINTAJ REVOJ," Canto en Esperanto por la Srta. Beatriz Nolasco, acompañada al piano por la Srta. Margarita Zamora.
"AÑORANZAS," Vals. (F. Buencamino, letra del Sr. J. R. Teotico) cantada por la Srta. Rosa Lim acompañada al piano.
Discurso en Esperanto por el Prof. F. V. Freire traducido en Castellano por la Señorita Felicidad Zamora.
"TORNA AMORE," Buzzi-Peccia Melodía cantada por el socio Sr. Eufronio V. Tolentino, acompañada al piano por el Profesor Francisco Santiago
DISCURSO por Sr. Nicanor Iñiguez.
"SAN NICOLAS ESPERANTA KLUBO," Two-Step dedicada á la Sociedad por el socio Prof. Francisco Buencamino, ejecutada por la Orquesta Molina.
Discurso por el Hon. Macario Adriático.
"MIS ENSUEÑOS," Melodía (F. Buencamino, letra J. R. Teotico) cantada por el Sr. Luis Gonzalez-acompañada al piano
"AMOR CANICULAR," Poesía declamada por su autor, Delegado de la Sociedad, Sr. José R. Teotico.
"NON PARTIR," Tito Mattei. Melodía cantada por la Srta. Beatriz Nolasco y acompañada al piano por el Prof. Enrico Capozzi.
DISCURSO de Acción de Gracias por el Presidente de la Sociedad Sr. José Nolasco (hijo).
"BRIZAS DE MI PATRIA," Selección de aires filipinos. Composición del Prof. F. Buencamino, ejecutada por la Orquesta Molina.
BAILE.

The success of the evening was largely due to the following officers and reception committee:

Srtas. Beatriz Nolasco, Rosario Nolasco, Filomena Francisco, Dominga B. Francisco, Paz Maria Zamora, Matilde Arquiza, Feliza Castro y Amparo Concha.

Sres. José R. Teotico, Nicanor Iñiguez, José Nolasco (Hijo), Alfonso Ponce, Emiliano V. Tolentino, Cayetano Tecson, Alejandro Livioco, Antonio Tayson, Manuel Gómez, Severino Josue, Silverio Alcántara, Manuel de Santos, Francisco Zialcita, Eriberto Paterno, Florencio Gavino, Joaquin Borja, Melecio Arranz, y Benigno Gómez.

o

The Abeluyo Esperantista Klubo consists at present of about two dozen local esperantists who utilize the Club house for lessons and conversational practice. Particulars regarding classes, etc., may be obtained from Mr. Arnalot, Hotel de France.

MEMBERS WHO HAVE JOINED THE P.E.A. SINCE LAST ISSUE.

677 Mr. Josr Garau, La Campana, Escolta, Manila.
678 Mr. A. Jacumin, Phil. Division, Fort Santiago, Manila.
679 Mr. Benito Patricio, 600 Lemery, Tondo.
680 Governor Vicente Masigan, Cagayan, Ilocos Norte.
681 Mr. Policarpo M. Oconér, 81 P. Herera, Tondo, Manila.
682 Abelujo Klubo, 62 Calle Crespo, Manila.
683 Mr. P. Manuel Aguilar, Sta. Cruz, Laguna.
684 Mr. Mariano Bonifacio, Sta. Cruz, Laguna.
685 Lieut. D. M. Mulligan, Constabulary Hdqrs. Manila.
686 Mr Juan Nepomuceno, Juez de Paz, Victoria, Tarlac,
687 Mr. Francisco Soler, Antimonan, Tayabas.
688 Mr Baldomero Cosme, Pagsanhan, Laguna.
689 Capt. Antonio Estival, S. S "Bustamante" Manila.
690 "San Nicolas Esperanta Klubo," No. 45 Caballeros, San Nicolas.
691 Mr. Francisco Astudillo, No. 213 San Fernando, Binondo.
692 Mr. Antonio M. Tayson, No. 32 Alvarado, Meisic
693 Miss Genoveva Camaclan, San Francisco de Malabon, Cavite.

We have received to date (Dec. 17) renewals of subscriptions from the following members

P. E. A. Nos. 1, 2, 3, 5, 6, 11, 12, 14, 15, 16, 17, 18, 19, 20, 27, 28, 29, 32, 37, 44, 45, 47, 48, 52, 62, 64, 66, 68, 69, 81, 84, 85, 91, 100, 103, 126, 138, 142, 144, 156, 162, 163, 165, 167, 172, 173, 175, 187 189, 192, 194, 195, 201, 211, 212, 214, 215, 216, 221, 234, 245, 236, 237, 238, 239, 241, 246, 251, 258 265, 267, 275, 277, 279, 280, 281, 291, 295, 296, 300, 302, 306, 318, 321, 322, 323, 325, 327, 333, 341, 348, 351, 359, 373. Subscriptions received after this date will be printed in next issue.

Digitized by Google

LA PAZ Y BUEN VIAJE

Fabrica de Cigarros, Cigarrillos y Picadura

: : CALLE ASUNCION No. 111, SAN NICOLAS : :

PREMIADA CON MEDALLA DE ORO EN LA EXPOSICION DE SAN LUIS : : :

FUNDADA DESDE EL AÑO 1883

Productos selectos y renombrados; empleando solamente en su elaboracion HOJAS ESCOGIDAS de las mejores Vegas de ISABELA y CAGAYAN : : : : : : :

PROBAD Y OS CONVENCEREIS

HOTELS

HOTEL DE FRANCE

ESCOLTA

CENTRAL POSITION,
GOOD TABLE AND ALL
MODERN CONVENIENCES

Correspondence in English, Spanish, French an Esperanto.

JUST RECEIVED
CONSIGNMENT OF THE
AMERICAN ESPERANTO BOOK
THE TEXT BOOK THAT
IS MOST EXTENSIVELY
USED IN THE STATES

PRICE ₱2.00 - - - - - CLOTH

AMERICAN BOOK AND NEWS CO.
MANILA

BIBLIOGRAFIO

INTERNACIA LEGOLIBRO 1ª parto de Emil Stark kaj Fr. Rockmann. Magdeburg. H. Wuttke Prezo, 1,20M.

LA KIALO DE LA VIVO, tradukita el la franca lingvo. Prezo 0,60 M.

JOLANTO, LA FILINO DE L' REGO RENÉ. Laŭ la dana originalo esperantigis Hj. J. Runeberg. Helsingfors Ilarejo Esperantista.

ESPERANTO FOR THE ENGLISH. Grammar, Exercises, Correspondence, Conversations, Vocabulary, by A. Franks. Milner & Co., Ltd., 15ª Paternoster Row, London.

THE PICTORIAL ESPERANTO COURSE. An easy conversational method for young and old. By W. Mann. The British Esperanto Association, 133 High Holborn, London W. C.

SVEDA JARLIBRO ESPERANTISTA 1908 de P. Ahlberg. Stockholm. Sveda Esperantista Societo.

THE ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY by Joseph Rhodes. London E C.: Stead's Publishing House, 40 Whitefriars Street.

ESPERANTO SELF-TAUGHT. By William W. Mann. London. E. Marlborough & Co., 51 Old Bailey, E. C.

VIVAJ KAJ MALVIVA. De M. J. Goldsteĭn. Genevo. Presejo Alb. Kündig.

ROBINSON CRUSOE (ESPERANTO EDITION.)—Henry Altemus Co., Philadelphia, ₱1.00

KATALOGO DE LA BIBLIOTEKO DE GEORG DAVIDOV, SARATOV.—56 pag., 50 Sd.

HIGIENO KAJ MORALO, Dr. Paul Good; Presa Esp.-Soc., Paris.

A GRAMMAR AND COMMENTARY ON THE INTERNATIONAL LANGUAGE ESPERANTO. Maj.-Gen. Cox, 3rd Edition.

KIO POVAS OKAZI SE ONI DONACAS SURPRIZE. Cefec dua eldono. Int. Prop'ejo Melton Abbey, London.

LA DOGMARO PRI LA VIVO POR LA NOVA JERUSALEMO—el la latina de Emanuel Swedenborg—The Swedenborg Soc., 1 Bloomsbury St., London.

KORESPONDADO

G. WERNICKE, komercinstruisto, Bremen, Ansgaritorstr. 22, Germanujo, deziras korespondadi kaj interŝange postmarkojn.

S-ro K. HLARVATSCH, Bahnhofstrase, Teplitz, Bohemia, Austrla deziras korespondadi per ilust. postkartoj; tuj respondos.

S-ro I. SHKABARA, Nikolaevskaja 33 log. 24, S. Peterburg, Russia, deziras korespondadi, per ilust-postkartoj kun ekstereuropaj gesamideanoj; ciam tuj respondos.

S-ro N. PARKEVIC, Nikolaevskaja 33 log. 24, S. Peterburg, Russia, deziras korespondadi per ilustritaj postkartoj kaj intersange postmarkojn.

*Deziras korespondadi postcarte:

*Otto Metzger, Prag-Wysocan No. 196, Bohemia, Austrla.
*S-ro H Wuttke, Pionierstrasse 21, Magdeburg, Germany.
*S-ro Frantisek Kail, Praha VIII, 793, Austria
*S-ro Th. Svendsen, Aalbargvej 40, Hjorring, Denmark.
*S-ro I Ivanovski, students-medicinisto, Kavalergardskaja 16, lg. 13, St. Petersburg, Russia.
*S ro Marcel Levy, Frue Porte a Meuse, St. Mihiel, Meuse, France.
*F-ino V. A. Adomovic, Jensko-Medicinsij Institut, Arhierejskaja ulica, St Petersburg, Russia
*S-ro U. S. Lizlov, Reala lernejo, Sumi, Harkovskoj gub., Russia.
*S-ro Fr Peessnegger, Choceu, Bohemia, Austria.
*S-ro N. Hohlov, 18 Maryno domo, 18 Otdelenje derev. Moscow, Russia
*S-ro Jan. Balley, Doudlevce c. 18, Bohemia, Austria.

Digitized by Google

Ask for Cow's Head Brand



There is nothing purer—

Direct from Switzerland to us

Kuenzle & Streiff

AGENTS

Phone 113 **43 Calle David**

Digitized by Google